



Aprilo

2024

# Esperanto-Informilo



Foto: Prunus serrulata , la japana ornama ĉerizarbo en marto `24  
fotografita de U. Fellmann

## Mezaĝo de la prezidanto:

La aprilo venos kun grandaj paŝoj kaj belegaj floroj jam ĝermas kaj ekfloras. Estas jam baldaŭ tempo por paŭzi kaj pikniki en la naturo sub blua ĉielo aŭ kultivi humidan kaj humoriĉan grundon por posta riĉa rikolto. Ke humeco estas grava afero por la homaro vi povas legi en eseo „Tergrundo kaj klimato“.

Informriĉan kaj amuzegan legadon,

Georg Hennemann, 27.3.2024

## Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

## Kolofono:

Redaktoro teamo:  
Georg Hennemann  
Ulrich Fellmann  
Korektanto:

**Esperanto-Gesellschaft  
Frankfurt am Main e.V.**  
[www.esperanto-frankfurt.de](http://www.esperanto-frankfurt.de)

Vorsitzender:

Georg Hennemann  
Rehgartenstr. 16  
35683 Dillenburg  
Tel. 02771-8196614

## Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M  
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01  
BIC: DRESDEFFXXX  
bei: Commerzbank Frankfurt

## Jahresbeitrag

ESF+DEB-Beitrag: 96 €  
Familienmitglied: 48 €  
Nur ESF: 24 €  
Familienmitglied: 12 €

# Programo

## **“Unua mardo”**

la 2-an de aprilo 24

ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zumo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

## **“Tria mardo”**

surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt

Dienstag, den 16. April, 24

Mardon, la 16-an de aprilo, 24

19:00 h

"Membrokunveno"

(sen estrarbaloto)

--

"Mitgliederversammlung"

(ohne Vorstandswahl)

## **“Kvara mardo”**

la 23-an de aprilo, 24

ekde la 19h horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo

Stattdcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt/Main

Bildfonto kappago: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm




By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,

[https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape Frankfurt 2021 Panorama.jpg](https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg)





# El la klubo

---

## Anoncoj:

- |  |  |
|--|--|
|  16.4.24        | Membrokunveno la trian mardon de aprilo                                  |
|  07.09.24       | Propono: Migrado kun jubilea evento en naturamika dometo aŭ Kradrokabano |
|  5.8. – 15.8.24 | Someraj ferioj de Saalbau-MÜZ  |

## Eventoj en la Rajn-Majn-Regiono:

- |  |   |
|--|---|
|  18.05.2024 | Propono: ESF-Infomstando en la urbocentro |
|  15.06.2024 | Propono: ESF-Infomstando en la urbocentro |
|  20.07.2024 | Propono: ESF-Infomstando en la urbocentro |
|  17.08.2024 | Propono: ESF-Infomstando en la urbocentro |

# Tergrundo kaj klimato

Opinia eseo de G. Hennemann

Pri la teorio de plirapidigismo aŭ akcelerismo kiun mi supraĵe prezentis en la antaŭa eldono mi nur diru, ke ĝi desegnas tre negativajn scenarojn por la homaro, kiuj laste gvidus al distopio aŭ eĉ apokalipso. Sed ni ne estu tiom pesimisma. Ekzistas ja kaj realismaj kaj realigeblaj iniciatoj por savi nian planedon, ankaŭ antaŭ trovarmigo, eĉ sub la nuntempa politika ‚kasto‘ kaj iliaj ‚kapitalistaj regimentoj‘. Por nur nomi unu ekzemplon – se la forceja efiko kaj la observata klimatsanĝiĝo vere tiom rilatas de la koncentriĝo de la spurgaso karbondioksido en la aero, ni devas trovi rimedojn limigi la ellason de ĝi en la atmosferon: La sciencistoj ja kvazaŭ ĉiutage avertas, ke tro da karbono en formo de karbondioksido estas nun en la aero. Aliflanke ili ne suface avertas ke tro malmulte da karbono restas nun en la tergrundo! Do ni nepre devas remeti la karbonon el la aero en la grundon. El artikolo de TAZ-gazeto mi citas: “Dum la lastaj cent jaroj, tutmondaj grundoj perdis masivajn kvantojn da humo<sup>1</sup>, kiu konsistas ĉefe el mortintaj organismoj kaj organika karbono. Agroindustriaj teknikoj kiel profunda plugado, kemiaj sterkoj kaj insekticidoj igas grundvivojn morti kaj tiamaniere liberigas karbonon kiu oksigeniĝas al karbondioksido en la aero. La natura humo-proporcio antaŭe estis 5 ĝis 10 procentoj, sed hodiaŭ ĝi estas kutime nur 1 ĝis 2 procentoj – do preskaŭ temas pri dezerta grundo. La indicoj de degenero de fekunda grundo estas ĝis 100 fojojn pli grandaj ol la indicoj de ĝia renovigo. Britaj esploristoj avertas, ke restas nur ‚tergrundo por 60 ĝis 100 kultivaĵoj‘. La forcej-efikaj gasoj de la agrikultura industrio kiel ekzemple la insekticidaj produktantoj, fabrikfarmistoj kaj manĝaĵentreprenoj respondecas ĉefe pri la tervarmiĝo. Inkluzive de senarbarigo, transportado kaj manĝaĵmalŝparo, ili respondecas pri 38 ĝis 57 procentoj de tutmondaj emisioj, laŭ studo de la NPO Greno (angle: Grain). Peza maŝinaro kompaktas la grundon, liberigante nitrooksidon, kiu estas 300 fojojn pli malutila al la klimato ol CO<sub>2</sub>. Kaj tiu fabrika terkultivado produktas metanon, 25 fojojn pli malbonan ol CO<sub>2</sub>.”

Do, la solvo estas suface facila: Ni denove zorgu kaj gvatu nian valoran tergrundon, simile kiel niaj gepatroj faris kaj kiel la homoj en ruraj regionoj de Afriko kaj Azio ankoraŭ nuntempe faras. Ni ne lasu niajn valoran tergrundon plu detrui, sed aktive helpas regenerigi ĝin per aldono de humo. Ĉu vi jam preparas vian propran komposton kaj kultivas vian propran terpecon? Ni ja bezonas pli da iniciatoj kaj kooperativoj kiuj prizorgas la tergrundon. Do anstataŭ manifesti kontraŭ klimatsanĝiĝo, globvarmiĝo, plirapidigismo aŭ la aĉa agrikultura industrio ni montru al homoj kiel semi kaj planti, kiel fondi agrarkooperativojn por prizorgi nian tergrundon per ege mankanta humo. Kaj tiel ni kaptas du muŝojn per unu bato. Propra manlaboro sur tergrundo kaj kultivado de plantoj ege trankviligas nian ekscititan homan staton kaj kondukon, ĝi estas samtempe bona mensa kaj fizika terapio kaj malrapidigilo. Se vi volas scii pli bonvolu legi la esperantan verkon de William Frederick Rolt kun titolo „El la polvo de la tero“. Ekfloras nun multaj iniciatoj, la plej konata estas la „4 pro 1000“ aŭ “kvar promilo”. Tiu ĉi signifas, ke se la nivelo de karbono stokita en la supraj 30 ĝis 40 centimetroj de grundo pliiĝus je 0,4% (aŭ 4‰) jare, la ĉiujara pliiĝo de karbondioksido (CO<sub>2</sub>) en la atmosfero estus signife reduktita. La grundoj de la mondo enhavas 2 ĝis 3 fojojn pli da karbono ol la atmosfero kaj ĉi tiu kreskorapideco de 4‰ jare en grundaj karbonprovizoj estu la direkto por sekvi. En plej simplaj vortoj, la iniciato „kvar promilo“ postulas, ke landoj ĉerpu pli da karbono ol ili ellasas en la atmosferon, kaj stoku ĝin en la grundo. Kiel? Pligrandigante regeneran agrikulturon, paŝtadon kaj malnovajn kultivadpraktikojn. Tiuj praktikoj kondukas al pliiĝo en fotosintezo - la propra sistemo de naturo por eltiri troan karbonon el la aero kaj stoki ĝin en la grundo. Do estas tempo por sendi SOS-signalon al la homaro: SOS – “Savu onian subteron” (angle: “Save our soils”) – aŭ kiel oni diras en loka hesia dialekto: „Humus is das was de Bodde huh muß“, elgermanigita: “Humo estas tio kion la grundo havendus”

Ligiloj:

<https://taz.de/40-Jahre-taz-Humus-und-Aeckerboeden/!5536139/>

[https://eo.wikipedia.org/wiki/El\\_la\\_polvo\\_de\\_la\\_tero](https://eo.wikipedia.org/wiki/El_la_polvo_de_la_tero)

<https://4p1000.org/discover/?lang=en>

<https://gemueserevolution.de/foodscaping/>

<sup>1</sup> ne konfuzo la terminon humo kun humuso kio estas kikerkaĉo

## Rakonto

---

La 8-a de marto  
(de Felmano Ulriko)

Inter la 8-a kaj 12-a de marto (la dato precize ne konata) de la jaro 415, la filozofino, astronomino kaj matematikistino Hipatia, loĝinta en la greka urbo Aleksandrio, estis murdita de kristanaj fanatikuloj.

Ŝi estis filino de Teono de Aleksandrio, fama matematikisto kaj astronomo, kiu ĉefadministris la Bibliotekon de Aleksandrio. Ŝi neniam edziĝis, kaj studadis kaj instruis en la muzea lernejo. Laŭ nepruveblaj rakontoj, ŝi estis la inventisto de la astrolabo kaj la hidrometro.

Kiel konsilistino de la guberniestro de Aleksandrio, Orestes, ŝi pli kaj pli implikiĝis en la religi-filozofiaj disputoj inter Orestes kaj la kristana episkopo de Aleksandrio, Cirilo, kiuj pli kaj pli akriĝis, ĉar Cirilo postulis malpermeson de ĉiuj aliaj kredoj. Hipatia mem favoris la filozofion de novplatonismo, sed ne agitis kontraŭ iuj alikreduloj. Ŝi opiniis, ke racio, klasika filozofio kaj kristanismo povus pace kunekzisti.

Ekzistis tamen eĉ pli minaca partio en la urbo, kiu eĉ kontraŭis la episkopon: la "parabolaroj", kristanaj

fanatikuloj kies doktrino estis la serĉado de martireco, ekz-e per intenca kontaĝo dum flegado de pestaj malsanuloj, kio iliakrede gvidus al glora rekompenco en ĉielo pro kunsufera amo.


Grupo de tiuloj en la marto 415 sturmis la bibliotekon, kaj akuzinte Hipation apliki magion, havi kontakton al fantomoj, kaj subteni la dividon inter regno kaj eklezio, kruele mortigis ŝin per senhaŭtigo (tiel ilia kunhoma amo).

La verkoj de Hipatia estas perditaj, eble kun la konjektita brulado de la fama biblioteko de Aleksandrio. Sciatas nur, ke ŝi komentis la Almageston de Ptolemajo kaj la Aritmetikon de Diofanto.

La memoro pri tiuj okazoj konserviĝis, kaj la opinio pri Hepatio en la kristana intelektularo iam pozitivigis. Dum la 20-a jarcento, la itala katolika poeto, dramaturgo kaj literatura profesoro pri franca literaturo en Florenco, Mario Luzi (1914-2005), unufoje nomumita por la Nobelpremio de literaturo, verkis versforman dramon pri la martireco de Hipatio, en kiu ŝia martirigita korpo estas komparata al tiu de Jesuo. Ĝia unua prezento okazis en Milano.

## El la kluba historio

El la klublibro, volumo 3 de aprilo 1986 ĝis 2001, mi scanis paĝon de la partoprenantoj al membrokunveno por la jaro 1990, kiu okazis la sepan de marto 1991



## Diversaĵoj

**Ŝerco** (sendita de Gundhild):

Aŭtomobilisto alveturas al benzinstacio en komplete premkavigita aŭto kaj diras al la benzinvendisto: - Bonvolu lavi mian aŭton.

Benzinvendisto: - Ĉu mi ankaŭ gladu ĝin?

**Proverbo de la monato** (de G. Hennemann)

La proverbo, kiujn mi hodiaŭ prezentas, temas pri falsa humileco aŭ malprudenteco

[zam-288.01] Se vi faros vin ŝafo, la lupoj vin manĝos

Kiam iu minacas aŭ jam sieĝas vin kaj vi malfermas al li la pordon, ne miru se li prenas ĉiun vian havaĵon kaj eĉ vian vivon.

Fonto: [http://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme\\_0288.htm](http://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme_0288.htm)

## Enigmo (de Felmano Ulriko)

La sekva teksto aperas en tre fama romanserio. La enigmo konsistas el du demandoj:

1. Kiel nomiĝas la romanserio?
2. Kiel al ĝi rilatas la nombro 1764?

Sur la planedo Golgafrincham loĝis tri grupoj da homoj:

A – la gravuloj, sciuloj, artistoj ktp.

B – enuataj filmproduktistoj, telefonaj desinfektistoj, frizistoj, oficistoj por publikaj rilatoj, firmaaj konsilistoj, asekuraj agentoj, gardistoj, ĉambristoj, ktp.

C – tiuj, kiuj faris la tutan laboron.

Iam la planedaj saĝuloj planis forsendi la senutilan grupon B. La saĝuloj diris al la B-uloj, ke la tuta loĝentaro de la planedo devas esti evakuota, kaj la B-uloj foriru per la unua kosmoŝipo – la arkeo B – por ili bele preparu la novan hejman planedon. Kompreneble, la A-uloj kaj C-uloj neniam planis sekvi. Tamen, kelkajn jarojn poste ĉiuj mortis per ia malbonega viruso kiu disvastiĝis per malpura telefono. La ŝipo de B-uloj finfine falegis al planedo, sur kiu nur kavernhomoj vivis. Sekve la kavernhomoj formortis kaj la B-ulidoj enloĝis la planedon, kiu estas hodiaŭ nomata Tero.

Solvo de la enigmo el la lasta ei

Mi ĝojas, ke Georgo solvis almenaŭ tri de la kvar demandoj. Por doni plian ŝancon solvi la tuton, mi ankoraŭ ne publikigas la solvojn, sed donas aldonan tempon.

La solvojn sendu al Felmano Ulriko, aŭ en la kluban Telegraman kanalon, aŭ poŝte, aŭ retroŝte al:

[ulrich.fellmann@gmx.de](mailto:ulrich.fellmann@gmx.de)

## La povo de vortoj

---

### Ekzemplo por kiel hazardo, kutima lingvouzo kaj arbitraj difinoj influas nian rigardon de la realo

(de Felmano Ulriko)

Je la 29-a de marto 1807, la germana inĝeniero Heinrich Olbers malkovris la planedon Vesta. Tiu estas la plej hela planedo de la asteroida zono, kaj la sola de la planedoj tie, kiun oni povas sen teleskopo vidi okule sur la nokta ĉielo.

Tamen, post la malkovro de la planedo Neptuno en 1846, kaj de Hebe en 1847, kiuj tiam estis la 13-a kaj 14-a planedoj de nia sunsistemo, astronomoj ne plu ŝatis ke la nombro de planedoj daŭre kreskis. Pro tio Aleksandro de Humboldt' proponis limigi la nombron de grandaj planedoj al ok, kaj por remalgrandigi la nombron de planedoj, oni decidis, ke tiuj planedoj, kiuj ne atingas la diametron de la planedo Merkuro, ne plu estu nomataj planedoj, sed nanoplanedoj aŭ asteroidoj. Tamen, oni ne ekkutimis nomi la aliajn planedojn "grandaj planedoj", sed pro laceco kutimiĝis al nomi ilin simple "planedoj". Pro tio oni kutimiĝis senti, ke nanoplanedoj ne estas nanaj planedoj, sed entute ne planedoj. Sekve de tiu decido pri inventi la terminon "nanoplanedo", malaperis ses planedoj el la plej multaj libroj kaj el la konscio de la homaro.

Kiam poste astronomia enkonduka verko priskribis nian sunsistemon, ĝi simple tekstis "la sunsistemo havas ok planedojn" (Plutono ankoraŭ estis ne malkovrita). Hodiaŭ, eĉ multaj science edukitaj homoj ofte neniam aŭdis pri la iamaj planedoj Ceres, Palas, Vesta, Juno, Hebe kaj Astraea. Nek pri tiuj, kiujn oni trovis poste, en pli granda distanco ol Plutono, kiel Eris, Haŭmeo, kaj multaj aliaj.

Je la 24-a aŭgusto 2006, dum la Internacia Astronomia Kongreso en Prago, la astronomoj decidis ŝanĝi la statuson de Plutono kaj kategoriigi ĝin kiel nanoplanedon, nun laŭ la nova kriterio de orbita domineco (kune kun la novmalkovritaj aliaj "objektoj"). Tiam okazis protestoj, multaj nomis tiun decidon "arbitra", "sensenca", "stulta", aŭ "freneza", nesciinte, ke Plutono laŭ la supre menciita difino aplikita post 1847, devintus ne esti nomita planedo dekomence. Tamen, kiam Plutono estis malkovrita en la jaro 1930, ĝi tiam estis la unua tia malkovro de usona astronomo, kaj sekve de tio en Usono la novkovrita asteroido Plutono furoris en ĉiuj gazetoj kiel novtrovita "planedo". Pro tiu publika premo, la Astronomia Unio tiam devis akcepti Plutonon kiel (kvazaŭ granda) planedo. Tamen, post malkovro de pluraj simile grandaj etaj "planedoj" en eĉ pli granda distanco ol Plutono ĉ. 70 jarojn poste, ekz-e Eris en 2003, la astronomiistoj korektis tiun mispaŝon, kaj deklaris Plutonon nanoplanedo.

Kiam oni hodiaŭ demandas iun meze aŭ eĉ bondukitan homon "kiom da planedoj ekzistas?" tiu preskaŭ ĉiam diras aŭ "ok" aŭ "naŭ", aŭ "estis naŭ, sed oni Plutonon ne plu kalkulas". Apenaŭ iu scias, ke tiuj nombroj estas ambaŭ tute arbitraj kaj nur konataj pro hazardaj decidoj de iuj astronomiistoj, kaj ke nia sunsistemo havas pli ol dudek planedojn, el kiuj ok nomiĝas "grandaj", la aliaj "nanoplanedoj". Ankaŭ ne konatas al multaj, kio estas la asteroida zono, la Kuiper-zono kaj kio kaj kie estas la "Oorta Nubo".

Ĝojofakto: je la 12-a de julio 2011 la planedo Neptuno finis sian unuan plenan rondiron ĉirkaŭ la suno depost sia malkovro en 1846. Tiam ĝi estis la 13-a planedo, post la rondiro li nun estis nur la 8-a.

Dua ĝojofakto: jam Galilejo malkovris kaj notis Neptunon, pli ol ducent jarojn antaŭe, sed tiam mise juĝis ĝin esti fiksa stelo.

Plia ĝojofakto: Ekzakte dek jarojn post la nanplanedigo de Plutono, je la 24-a aŭgusto 2016, astronomoj malkovris la ekzoplanedon Proksimo b, kiu orbitas sian sunon Proksima Centaŭro, la stelo plej proksima al nia sunsistemo, t.e., nia najbara sunsistemo. Kiom da planedoj ĝi entute havas estas ankoraŭ ne konata, same ne, kiom da ili estas nomitaj "planedoj" de la eble tie loĝantaj inteligentaĵoj.





Kial ni fakte diras "aprilo-aprilo" kaj kiu inventis la diron?

Sed unue, ni demandu nin pri kio temas la historio malantaŭ la aprila trompotago:

Se vi estas viktimo de petolado farita la 1-an de aprilo, vi estas laŭvorte "senditaj al aprilo". Fine, por solvi la ŝercon, oni uzas la esprimon "Aprilo! Aprilo!". Ne estas klare, de kie venas ambaŭ diroj. "Sendu al aprilo" unue aperis skribe en Bavario en 1618.

Estas same necerte kial ĉi tiu aparta dato fariĝis tago de ŝercoj kaj petoloj. La kutimo ofte rilatas al la nekonstanta, neantaŭvidebla aprila vetero. Ankaŭ la germana eldiro "April, April, der macht, was er will", elgermanigita "aprilo, aprilo, li faras tion, kion li volas" klarigeblas per la nekonstanta vetero dum la transiro de vintro al printempo. Aliaj historiaj faktoj kiuj iel rilatas estas la por la 1-a de aprilo 1530 planita monerotago (dt: Münztag) por normigi la valuton dum la Augsburga 'Reichstag'. Multaj spekulistoj perdis sian monon tiun tagon kaj estis pririditaj kiel malsaĝuloj ĉar la anoncita monerotago neniam okazis. Alia dato estas la jaro 1564, kiam Karlo la 9-a, reĝo de Francio, efektivigis kalendarreformon kaj movis la komencon de la jaro de la 1-a de aprilo al la 1-a de januaro. La reformo kaŭzis grandan konfuzon kaj provokis ŝercojn inter multaj francaj civitanoj. Ĉiu, kiu plu festis la novjaron la 1-an de aprilo pro nescio aŭ tradicio, estis ridindigita.

Ĉi tiuj du historiaj eventoj estas la plej verŝajnaj klarigoj por la aprila trompotago. Aliaj historiaj aŭ religiaj ligoj cirkulas kiel fonrakontoj ĉirkaŭ la unuan de aprilo. Sed neniu estas fakte dokumentita. Tamen, la kutimo sukcesis disvastiĝi de Eŭropo al (preskaŭ) la tuta mondo. En Francio, Italio kaj Belgio la tago estas festata same granda kiel ni konas ĝin en Germanio. Aprilaj trompisto ankaŭ petoludas unu la alian en Ameriko. Eĉ la amaskomunikilaro nun akompanas ĉiujare tiun kutimon, trompante nin per elpensitaj titoloj kaj lasante nin legi artikolojn pri elfaritaj amuzaj temoj. Do atentu singarde la novaĵojn la 1-an de aprilo 2024.

Fonto: <https://www.westwing.de/inspiration/wellbeing/unterhaltung/april-april-die-37-besten-aprilscherze-ideen/>

## Berichtigung der Tagesordnung

Die Mitgliederversammlung am 16.04.2024 im Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt findet **ohne Vorstandswahlen** statt.

Der Vorstand wurde am 25.04.2023 für zwei Jahre gewählt, dh laut Satzung finden in der MV am 16.04.2024 keine Vorstandswahlen statt und die Tagesordnungspunkte TOP 10 (Wahl der Wahlleitung), TOP 11 (Wahl des Vorstands) entfallen entsprechend.

Tagesordnung (korrigiert)

Beginn: 19:00 Uhr

TOP 1: Begrüßung, Feststellung der Beschlussfähigkeit

TOP 2: Findung eines Protokollanten

TOP 3: Annahme der Tagesordnung

TOP 4: Genehmigung des Protokolls der letzten Mitgliederversammlung

TOP 5: Tätigkeitsbericht des Vorstandes

TOP 6: Finanzbericht des Rechnungsführers

TOP 7: Bericht der Kassenprüfer

TOP 8: Diskussion der Berichte

TOP 9: Entlastung des Vorstandes

TOP 10: Wahl neuer Kassenprüfer

TOP 11: Programmplanung

Anträge bitte bis zum 02.4.24 schriftlich oder per Email an [estraro@esf-listeo.eu](mailto:estraro@esf-listeo.eu)

(1) Ĉar la ESF estas registrita asocio ("e.V.") kun imposta avantaĝo, membrokunveno devas esti anoncata kaj protokolata en la germana lingvo.